

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 19.6.2013

Jiří Vítězslav Šamla

Miroslav Malovec

Jiří Vítězslav Šamla naskiĝis la 17-an de septembro 1913, sekve ĉi-jare ni festas 100-an datrevenon de lia naskiĝo. Ni bezonas memori lin, ĉar li apartenis al la plej gravaj ĉeĥaj esperantistoj inter la du mondmilitoj ne nur en Brno, sed en la tuta Ĉeĥoslovakio. Li meritis ĉefe pri Verda Stacio kaj aktora grupo TRAKT.

Sed ni komencu de Adamo, kiel oni diras. La 18-an de majo 1923 en Praha-Kbely komencis regule elsendadi radiostacio de societo Radiojournal. Samjare Augustin Pitlík sukcesis elsendi unuajn esperantlingvajn propagandajn prelegojn, kiuj ricevis bonan eĥon el la tuta Eŭropo. En 1928 Praha elsendis radiokurson de Esperanto de Josef Eiselt. Aktive helpis ankaŭ Ota Ginz, kiu enĉeĥigis libron de Aisberg „Fine mi komprenas la radion!“. En 1932 Radiojournal ricevis novan domon, veran palacon por aranĝi studion, sed tiam ĝi ĉesis elsendi esperantlingve. La iniciaton transprenis Verda Stacio en Brno kaj Praha nur relajsis kelkajn elektitajn programojn, do sendis ilin plu, sed ne preparis ilin.



JIRI VITEZSLAV ŠAMLA

En la jaro 1927 Radiojournal Brno elsendis la unuan Esperanto-kurson por komencantoj, kiun gvidis Josef Bednář. Inter la kursanoj estis ankaŭ Marie Strejčková-Šamlová kaj ŝia 13-jara filo Jiří. Post kvar jaroj Marie Strejčková, tiam jam vicprezidantino de esperantista klubo, proponis al la redakcio de Radiojournal prelegon pri Napoleona ekspozicio de Slavkov. La 24-an de junio 1931 ŝi efektive legis la prelegon en la radio. En la sama jaro ŝia 18-jara filo fariĝis redaktoro de elsendado por eksterlando, do ni



povas supozi, ke li klopodis helpi al la patrino akceptigi Esperanton por programoj. Sed novan prelegon oni permesis al ŝi nur post unu jaro, en aprilo 1932, pri tutsokola kongreso. Sekvis prelegoj ĉiusemajne, kiujn legis plej ofte ŝi mem, sed aperadis ankaŭ aliaj prelegantoj, ekzemple Baďura, Bárta kaj aliaj. La 28-an de junio 1932 Jiří V. Šamla la unuan fojon prelegis kune kun Dalibor Chalupa — kiel temon ili elektis filmon kaj teatron. Poste li havis multajn aliajn prelegojn kaj programojn pri diversaj scenoj.

Ni devas mencii ankaŭ tion, ke al Verda Stacio kontribuis ankaŭ redakcioj en Moravská Ostrava, Bratislava kaj Košice. Kelkajn programojn ili nur relajsis, aliajn eĉ mem preparis. Aktiva estis ĉefe la redakcio en Moravská Ostrava, kiu elsendis sume 116 proprajn paroladojn, 1 koncerton kaj 1 radiofilmon. La unuan prelegon legis Jaroslav Hladký. En Bratislava helpis d-ro Stanislav Kamarýt, Vlado Jukl, A. Macek kaj H. Kesik.

Kompreneble ankaŭ en Brno laboris ne nur Jiří Vítězslav Šamla kun sia patrino. Ni devas

mencii ankaŭ la nomojn Antonín Slavík, direktoro de Verda Stacio, kiu poste pereis en koncertejo, Theodor Kilian, tiam prezidanto de nia klubo, reĝisorojn Dalibor Chalupa kaj Josef Bezdiček, Břetislav kaj Marie Bakala, Jan Plichta kaj ĉina doktoro Kao. Aperas tie eĉ nomo de adoleskanta junulo Ivan Blatný, naskiĝinta en 1919, posta fama poeto, kiu en sia poezio uzis elementojn el latino kaj Esperanto. Inter la prelegantoj aperas František Baďura kaj František Válka, kiuj estis ankaŭ prezidantoj de la klubo.

Sed plej glora parto de Verda Stacio estis membroj de grupo TRAKT, kio signifas Teatraj kaj radio-aktoroj. Ĉar Verda Stacio elsendis ne nur propagantajn prelegojn pri Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ artajn programojn, koncertojn, teatraĵojn, operojn kaj operetojn. En la grupo aktoris profesiaj aktoroj kaj kantistoj, el kiuj plej famaj estas Karel Höger, Jarmila Kurandová, Vladimír Leraus, verkisto František Kožík kaj lia edzino aktorino Zdena Švábíková. Pli ol dudek personoj laboris en la grupo. Kutime ili elsendis la teatraĵojn ĉeĥlingve kaj poste ankaŭ en Esperanto. Plej ofte tiujn teatraĵojn esperantigis Jiří Vítězslav Šamla.

Kiam li komencis labori kiel redaktoro de Radiojournal, li havis 18 jarojn, kiam la dua mondmilito silentigis Verdán Stacion, li havis 25 jarojn. Do la tutan esperantlingvan laboron li faris kiel junulo, preskaŭ knabo. Li verkis du lernolibrojn de Esperanto, nome *Moderní učebnice mezinárodního jazyka* kaj *Lidová učebnice esperanta* kaj vortaron *Šamliv lidový slovník esperantsko-český kaj česko-esperantský*. Kune kun Dalibor Chalupa li kompilis historion de Verda Stacio ĝis la jaro 1937. Li esperantigis opereton de František Kožík *Sur rozoj sternite*, la plej sukcesan el ĉiuj elsendoj de Verda Stacio inter la du mondmilitoj. Plie ankaŭ *Balado pri okuloj de l' hejtisto* de Jiří Wolker, *Lunatika* de Jiří Mahen, *Forlasita* de Eduard Bass kaj du unuaktajn teatraĵoj de Averĉenko *Forta karaktero – Silentema najbaro*. La du lastaj aŭtoroj (Bass kaj Averĉenko) aperis ankaŭ libroforme, pli precize dirite kiel maldikaj kajeroj. Li mem havis en la radio minimume dudek prelegojn. Ni scias, ke li esperantistigis ankaŭ opereton *Pola Sango* de Oskar Nedbal kaj operon *Vendita Fianĉino* de Bedřich Smetana. Post la milito la saman operon tradukis ankaŭ Tomáš Pumpr kaj ties traduko konserviĝis. Jiří Šamla verkis kaj tradukis certe multajn aliajn tekstojn, kiujn li simple ne subskribis kaj tial ni ne scias, kies verko ili estas. Ekzemple en la stencilita gazeto Radiojournal estas multaj tekstoj ne subskribitaj.

Mankas ankaŭ informoj, kion li verkis ĉeĥlingve kaj en aliaj lingvoj, ĉar kiel redaktoro de radio kaj de ĝia elsendado por eksterlando li certe ne povis dediĉi sin nur al Esperanto. Ni nur scias, ke en la jaro 1941 li eldonis broŝuron *Veselý mikrofon*, kiu estas kolekto de anekdotoj pri radio. Ekzemple: *Edzino*: Hodiaŭ estis en radio tiom gaja programo, ke mia patrino duone mortis pro rido. *Edzo*: Bonege, mi tuj skribos al la radio, ke ili ripetu la programon. — Alia ekzemplo: Ĉu vi aŭdis pri la mono, kiun vi pruntis al via najbaro? — Jes, mi aŭdas ĉiutage, li aĉetis radion.

En 1944 Šamla publikigis libron de nelongaj lirikaj rakontoj *Kouzelný vlak* (Magia trajno), kiuj pruvas, ke li havis ankaŭ poeziajn ambiciojn. Cetere, publicisto Martin Reiner kolektas verkojn de tiel nomataj „forgesitaj poetoj“ kaj inter ili aperas ankaŭ la nomo de Jiří Vítězslav Šamla. Do verŝajne li verkis ankaŭ poezion, sed li ne sukcesis ĝin eldoni.

Kaj nun li venas al iom tikla afaero. Kiel redaktoro de radio, do publike aganta persono, li ne povis eviti dum la milito ankaŭ kontaktojn kun faŝistoj. Post la milito li estis kulpigita pri kunlaboro kun okupaciantoj kaj dum certa tempo eĉ en malliberejo. Tio ankaŭ kaŭzis lian disiron kun Esperanto-movado.

Post la milito Verda Stacio translokiĝis al Prago, ĉar la studio en Brno estis ruinigita de bomboj. Ĝis la jaro 1950 ĝi elsendadis programojn, el kiuj konserviĝis tre valoraj tekstoj de Tomáš Pumpr kaj eĉ unu sonregistraĵo, nome Najado de Antonín Dvořák, en traduko de Pumpr. Komenton legas Karel Höger, la ariojn kantas Maria Tauberová, Beno Blachut kaj Karel Kalaš, do majstroj de Nacia Teatro. Sur kazedo ĝin eldonis SONS – Societo de blinduloj – en 1996 okaze de UK en Prago kaj Ĉeĥa Radio jam dufoje elsendis ĝin dum lastaj jaroj kiel rarajon, ĉar Maria Tauberová neniam kantis Najadon sur la scenejo, do ĝi estas ŝia sola konservita registraĵo de tiu ario.

Sed ni revenu al Jiří Vítězslav Šamla. Li mortis la 14-an de majo 1994 kaj nur kelkajn jarojn post lia morto ni eksciis, ke post la milito li dediĉis sin al citrusoj, ke li estis tre respektata eksperto, verkinta plurajn librojn pri citrusaj fruktoj, membro de citrusaj societoj kaj kunlaboranto de radio,

televido kaj gazetoj. Liaj libroj estas Subtropy, Stavíme skleník z lahví, Adresář citrusáře, Citrusářův rok kaj Citrusy od A do Z. Bedaŭrinde trovi liajn kontribuojn por radio aŭ televido ne estas tiom facile kiel trovi eldonitajn librojn.



Marie Strejčková-Šamlová gvidis Esperanto-kurson por ĝendarmoj



Antaŭ la mikrofono, nederlandaninoj en folkloraj kostumoj. Maldekstre J.V. Šamla, meze Marie Strejčková-Šamlová, dekstre Jan Plichta



TRAKT: Antonín Klimeš, Anděla Novotná, Vladimír Leraus, Karel Höger (supre), Karel Urbánek (prezidanto de TRAKT), Konstantin Mátl, Zdeňka Švabíková, Antonín Fiala, Zdeňka Trdá, Jiří V. Šamla (sekretario de TRAKT), dr. František Kožík, Josef Bezdíček